

En tiu ĉi numero, legu pri:

✪ La 10-a KERo en Havano. ✪ La prezidanto de UEA inter ni. ✪ Spertoj de memlerninto. ✪ Aŭstrio agnoskas Esperanton kiel nemateriajn kulturheredaĵojn. ✪ Esperanto reprezentita en la Franca Liceo. ✪ Novaj ideoj por niaj kursoj. ✪ Argumentoj por lerni Esperanton. ✪ Datrevenoj: Kalocsay 50 kaj Auld 20. ✪ Oficiala informilo.

La 10-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo sukcese okazis en Havano

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



Kiel anoncite, de la 19-a ĝis la 22-a de februaro 2026 sukcese okazis la 10-a KERo en la Esperanto-Centro Havano. Ĝi ankaŭ estis finance subtenita de UEA, kio konsistigis gravan kontribuon por ĝia sukceso.

Malgraŭ ĉiuj obstakloj i.a. pri vetureblecoj kaj elektro, 47 kubaj geesperantistoj el 52 aliĝintaj, el 7 provincoj, aktive partoprenis la jaran eventon de nia Asocio. Ĉi-foje gravaj gastoj decidis kaj sukcesis vojaĝi al Kubo montrante sian volon plu prizorgi la funkciadon de landa asocio de UEA kies historio plenas je faktoj subtene al la internacia E-movado.

Entute 7 eksterlandanoj akompanis nin, el Brazilo, Germanio, Meksiko, Italio kaj Francio. Indas menciigi ke reprezentante de UEA Fernando Maia Jr., prezidanto, Martin Schäffer, ĝenerala direktoro, kaj Mallely Martínez, sekretariino, tre aktive partoprenis la kulturklerigan programon, kies ĉeftemo estis “Esperanto kaj lingva diverseco” sub la signo de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Kial? Ĉar dum la vojo al la revivigo de indiĝenaj lingvoj kaj kultura malkoloniigo prezentiĝas multaj defioj, la Jardeko ebligas esperigan platformon.

La temo rolis kiel voĝgvidilo por pritrakti la strategian planon de UEA (AKIRI), la agadon internacian de la movado, la plifortigon de edukado kaj instruado, planadon por ke pliaj kubanoj trapasu

KER- kaj ILEI-ekzamenojn, estontajn eventojn landajn kaj internaciajn en Kubo, interalie.

La 10-a KERo estis bona okazo por omaĝi la Esperantan poezion en la jaro de Kalocsay kaj Auld kaj ĝui belajn kulturklerigajn vesperojn kaj balojn, ĉar Kubo ankaŭ estas lando de muziko, poezio kaj danco.

Dum la renkontiĝo ankaŭ la Kuba ILEI-Sekcio viglis por pritrakti gravajn erojn de la E-instruado en nia lando gvide de Julián Hernández Angulo; en alia momento, itala esperantisto, Cristiano Bassani-

ni, diplomato laboranta en Kubo, ankaŭ prelegis pri diversaj projektoj italaj en la insulo.

Tiu ĉi nova okaziĝo de nia tutlanda renkontiĝo meze de la cirkonstancoj nune travivataj nialande, ebligis al ni repreni la kontakton ĉeestante kaj rompi la inercion por fiksi novajn celojn.

Sendube, la 10-a KERo en Havano kvazaŭ persiste respondis al la alvoko de Juliano, nia elstara instruisto kulturaganta: “Bonvenaj estas la manoj de ĉiuj, kiuj deziras aldoni sian helpon por puŝi la ĉaron”.



Supre, grupa foto de la partoprenantoj. Malsupre, de maldekstre: Prelegas Mallely Martínez (Meksiko), Lívio Lima (Brazilo). Dekstre Martin Schäffer, ĝenerala direktoro kaj Fernando Maia Jr., prezidanto de UEA.



Intensa agado de la prezidanto de UEA en Kubo: kunlaboro, eventoj, defioj...



ALBERTO FERNÁNDEZ-CALIENES BARRIOS

En aŭgusto pasintjare, tute hazarde en la sama tago kiam Radio Havano Kubo elsendis intervjuon kun li, la prezidanto de UEA, s-ro Fernando Maia Jr., kontaktis la aŭtoron per tujmesaĝilo por interkonsenti pri laborkunsido. Tiu efektive povis okazi nur meze de septembro, tiam per longa videobabilado.

Ni fakte konatiĝis en 2014 dum la 70-a IJK en Fortaleza, Brazilo, kiun Maia Jr. organizis, kiam la aŭtoro estis survoje al la 99-a UK en Bonaero.

La prezidanto montris profundan interesiĝon pri la funkciado de Kuba Esperanto-Asocio (KEA) kaj aparte pri ĝia membraro. Li anoncis programon por membri 101 kubajn esperantistojn al UEA kun kies sekretariino, s-ino Mallely Martínez, oni interkonsentis pri tuja ambaŭflanka aktualigo de la datumbazo, kompletigo de informoj kaj aliaj teknikaj taskoj.

Fernando malkaŝis sian longdaŭran revon viziti Kubon, planante tion por aprilo 2026, kiam estus okazinta la 10-a Kuba Esperanto-Renkontiĝo (KERo). Tamen ni sugestis antaŭan vojaĝon en februaro, okaze de la Internacia Librofoiro de Havano (FILH), kie KEA kaj UEA povus havi komunan standon sub la ŝildo "Esperanto". La estraro de KEA aprobis ŝanĝi la KERo-daton por ke la prezidanto povu ĉeesti. Bedaŭrinde, pro malfacilaj cirkonstancoj, la FILH ne okazis kaj estis definitive prokrastita.

Tio tamen ne malhelpis la planadon de oficialaj kunsidoj kun kubaj institucioj: Kongresa Palaco – kongresejo de la 75-a kaj 95-a UKoj, CUBATUR, vojaĝagentejo partnera de UEA por la tiujaraj eventoj, Ministerio pri Kulturo, Kuba Libroinstituto kaj Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU), kies kolektiva membro KEA estas i.a.

Kunsidoj ĉe la Kongresa Palaco kaj ACNU

La unua kunsido okazis en la Kongresa Palaco de Havano. Fernando Maia Jr., akompanata de Maritza (ĝenerala sekretario de KEA) kaj la raportinto, estis akceptitaj de la direktorino en la Granda Fojero, kiel ili nomas la kongresejan vestiblon.



Maldekstre:
En la Kongresa Palaco
(kongresejo de la 75-a kaj
95-a UK-oj)
kun Zósima López Ruiz,
profesia organizanto
de eventoj.

Dekstre:
Kun ambasadorino
Norma Goicochea Estenez,
prezidantino de ACNU.
Fotoj: Maritza Gutiérrez kaj
Alberto F. Calienes.

La kunsidon kun Yahima Valdés Martínez, direktorino de la kongresejo, ĉeestis Zósima López Ruiz, profesia organizanto de eventoj – kiu bone memoris pri detaloj de la UK-oj en 1990 kaj 2010 – kaj ankaŭ reprezentantoj de aliaj entreprenoj de la Grupo PALCO (mastrumado de kargoj, presejo, gastronomiaj servoj ktp.), la Ministerio pri Kulturo kaj CUBATUR, Ĉar Maia Jr. flue parolas la hispanan, oni rezignis pri interpretado, kio kreis spican etoson.

El la interŝanĝoj evidentiĝis, ke KEA en 2030, dudek jarojn poste, povus oficiale inviti UEA, TEJO kaj ILEI refoje kongresi en Kubo. La registaraj instancoj jam estis esprimintaj favoran sintenon kaj plenan subtenon.

Kelkajn tagojn poste sekvis vizito al la Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU), kie la prezidantino, ambasadorino Norma Goicochea Estenez, akceptis nin. La interparolo estis tre amika. Maia Jr. emfazis la lastatempan elekton de TEJO kiel sola junulara organizaĵo en la estraro de CoNGO (Konferenco de NROj en Konsultaj Rilatoj kun UN) por la periodo 2025-2029. Temoj kiel lingva justeco, kultura malkoloniigo kaj mondcivitana edukado estis traktitaj. Maia ankaŭ informis pri la kampanjo de UEA por ke plej multaj landoj deklaru Esperanton Kultura Nemateria Heredaĵo; post Pollando (2014) kaj Kroatio (2019), nun ankaŭ Aŭstrio sukcese aliĝis al la iniciato. Ne mankis informoj pri la agado por Esperanto en BRIKSaj landoj.

Ambasadorino Goicochea dum nia interparolo telefonis al la Kuba Nacia Komisiono de Unesko (CNCU), kies prezidantino memoris pri la partopreno de Esperanto (UEA) en la 43-a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Samarkando (Uzbekio, novembro de 2025). Maia Jr. nome de UEA donacis libron kaj ekzempleron de la *Kuriero* de Unesko en Esperanto.

Ĉe la Kuba Libroinstituto kaj kun la Estraro de KEA

En Malnova Havano, sur strato Obispo, la prezidanto de la Kuba Libroinstituto (ICL), Juan Rodríguez Cabrera, akceptis la prezidanton de UEA, la ĝeneralan sekretarion de KEA, Maritza Gutiérrez González kaj la aŭtoron, en paradizo por libroamantoj. Oni tie kompreneble parolis pri literaturo kaj





ne mankis la interŝanĝo de librodonacoj. Maia Jr. prezentis la Belartajn Konkursojn de UEA; el kuba flanko oni rememoris la fruajn tempojn de KEA ligitajn al la Fremdlingva Eldonejo José Martí. Maia Jr. proponis prepari por 2030 eldonojn de kuba literaturo, inkluzive de *Kuba Antologio* – aferoj kiujn KEA poste traktos kun ICL.

Apartan atenton ricevis la biblioteko de KEA, la instruistoj, la KEA- kaj KER-ekzamenoj, kunlaboro kun *edukado.net*, universitata instruado de Esperanto kaj la Delegita Reto. Celo estas ke ĉiu registrita aktivulo, membro de KEA kaj individua membro de UEA, fariĝu delegito (D, VD, JD aŭ FD) en sia municipo, por ke la reto spegulu la realan disvastiĝon de Esperanto en la lando.

Krome oni diskutis pri partopreno en la programoj “Polyglot Gathering” (organizataj de E@I) kaj en lingvaj festivaloj, pli konataj nialande. Kubaj esperantistoj nun videblas en eventoj de Bemba Polígloa – klubo de kubaj poliglotoj, kies reprezentantino ĉeestis la lastan tagon de la KERo.

Aliaj gastoj kaj junulara kunsido

Por partopreni en la 10-a KERo alvenis ankaŭ s-ro Martin Schäffer, ĝenerala direktoro de UEA, kune kun s-ino Mallely Martínez, kiuj kunportis librodonacojn por la biblioteko de KEA kaj malavare subtenis la kafopaŭzojn. Martin prelegis pri la nuna situacio, agadoj kaj planoj de UEA. Mallely prezentis spertojn de Meksika Esperanto-Federacio pri lingvoinstruado.



Maldekstre:
Kunsido kun la
Estaro de KEA.


Dekstre:
Dum la fermo de KERo,
Alberto F. Calienes,
Cristiano Bassanini
– itala diplomato deĵoranta
en Kubo –,
Fernando Maia Jr.,
Martin Schäffer
kaj Maritza Gutiérrez.
Fotaj: Livio Lima, Arkivo de
KEA, Fernando Maia Jr.

Fernando Maia Jr. aparte deziris kunsidi kun gejunuloj ĉeestintaj la KERon por trakti pri la revivigo de Kuba Esperantista Junulara Organizo (KEJO). Plejmulto el la junaj aktivuloj jam superis la TEJO-aĝlimon (35 jaroj), sed ili pretas subteni novajn membrojn per konsilado kaj mentorado. Konkretaj decidoj estas atendataj por ke baldaŭ ekfunkciu organizita junulara agado.

En Havano oni jam lanĉis prelegserion pri Esperanto en mezlernejoj, liceoj kaj politeknikaj institutoj, kun kursoj kaj instruistoj pretaj por la interesitoj de tiu aĝogrupa, tre grava por la estonteco de la kuba movado.

Unua vizito de UEA-prezidanto ekster la UKoj en Kubo

La vizito de Fernando Maia Jr. – la unua de UEA-prezidanto al Kubo ekster la okazigo de la Universalaj Kongresoj en 1990 kaj 2010 – donis okazon por rekta kontakto kaj konatiĝo kun multaj agadoj kaj aktivuloj el la tuta lando. Malgraŭ la prokrasto de la Librofoiro, la interŝanĝoj estis intensaj kaj promesplaj por estonta kunlaboro.



Fernando mem,
nome de KEA,
akceptis en la flughaveno
gastojn Martin Schäffer kaj
Mallely Martínez.
Memfoto: Fernando Maia Jr.



Maldekstre:
Interŝanĝo de librodonacoj
kun Juan Rodríguez Cabrera,
prezidanto de la
Kuba Libroinstituto.

Dekstre:
Kunsido kun gejunuloj.
Fotaj: Maritza Gutiérrez kaj
Fernando Maia Jr.

Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Kiel ni povas kontribui?

MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ



La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (JIL) estis proklamita de Unuiĝintaj Nacioj per Rezolucio de la Ĝenerala Asembleo, A/RES/74/135, Decenio Internacianal de las Lenguas Indígenas, DILI, por la periodo 2022-2032. Ĝia celo

estas altiri tutmondan atenton al la kriza situacio de indiĝenaj lingvoj kaj mobilizi rimedojn por ilia konservado.

La Jardeko serĉas konsciigi tutmonde pri la vundbla situacio de lingvoj de indiĝenaj popoloj.

Kial ni elektis temon sub la signo de la JIL kiel ĉeftemon de nia renkontiĝo? Kialoj estas diversaj.

Unue, pro la fakto mem, ke ni kiel Esperanto-parolantoj ankaŭ estas en minoritata situacio.

Due, ĉar indiĝenaj lingvoj gravas pro multaj kialoj. La unua estas la rolo, kiun lingvo ludas en la pensado de popoloj, en ilia kompreno pri sia loko en la universo, kaj precipe en ilia aliro al solvotrovado por siaj problemoj.



Kial Jardeko necesas?

La kriza situacio de indiĝenaj lingvoj evidentas. Oni taksas ke 40 % el la 7000 lingvoj de la mondo estas endanĝerigitaj [Fonto: UNESCO]

La Projekto pri Endanĝerigitaj Lingvoj dokumentis 3,054 endanĝerigitajn lingvojn tutmonde – preskaŭ duono estas en Azio. En Malajzio, 80 % de dokumentitaj indiĝenaj lingvoj estas endanĝerigitaj.

La situacio en Usono: Alarmaj statistikoj. El la 115 indiĝenaj lingvoj parolataj en Usono hodiaŭ, sanaj (flue parolataj) estas nur 2 dum en danĝero estas 34. Formortantaj ene de unu generacio es-

tas 79 laŭ raporto de Ethnologue / High Country News.

Situacio en Latinameriko kaj Karibio: Laŭ la atlaso latinamerika de indiĝenaj lingvoj, 38,4 % el 556 lingvoj indiĝenaj de Latinameriko kaj Karibio estas en risko malaperi.

La situacio en Meksiko: 16 lingvoj en kriza danĝero. Laŭ la *Monda Atlaso de Lingvoj*, de Unesko, 16 indiĝenaj lingvoj en Meksiko estas klasifikitaj kiel krize endanĝerigitaj. Similan situacion travivas aliaj indiĝenaj lingvoj en la sudamerika regiono.

Kion ni perdas kiam lingvo mortas?

Kultura scio, tradicioj, rakontoj, sociaj valoroj tra generacioj, ekologia scio, kompreno pri natura medio kaj daŭripova mastrumado, konekto al heredaĵo, valoroj kaj kutimoj, k.a.

Ĉiu perdo de indiĝena lingvo reprezentas signifikan kulturalan kaj intelektan malriĉigon por la homaro.

Kiel ni povas kontribui?

Ĉiuj havas rolon en la Jardeko! Eblas labori por konsciigo per parolado pri la graveco de indiĝenaj lingvoj en via rondo, subtenante organizaĵojn laborantaj kun indiĝenaj komunumoj, lernante vortojn en loka indiĝena lingvo (se ekzistas). La Jardeko finiĝas en 2032 – ĉiu jaro gravas!

Niaj kursoj: de tradicie ĉeestaj al renkontiĝaj kaj retaj

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO

Ekde la fondiĝo de la nuna Kuba Esperanto-Asocio, kiu baldaŭ festos sian 47-an datrevenon, ĝi



fokusiĝis al la instruado de Esperanto al interesitoj, ĉefe per regulaj kursoj. Sendube tiuj kursoj ebligis al signifnombro de kubanoj lerni la lingvon, kaj alikaze, konatiĝi kun ĝi, tiel kontribuante al la formado de movado, kiu

donis diskonigon kaj vivon al la lingvo per sabataj agadoj, eventoj, konferencoj kaj naciaj, regionaj kaj internaciaj kongresoj.

La cirkonstancoj de nia tempo devigas nin instrui la lingvon alimaniere kaj transiri de tradiciaj kursoj kaj klasĉambraj medioj al nova strategio.

Tiucele, ni instigas ĉiujn, kiuj atingis certan nivelo de lingva kaj komunikada kompetenteco, fariĝi mentoroj, “geonkloj”, kaj esti pretaj faciligi lingvo-lernadon per individuaj aŭ grupaj renkontiĝoj de du, tri aŭ kvar homoj jen hejme, en biblioteko aŭ ajna alia loko, kiun oni opinias taŭga, kun nivelo de respondeco, seriozeco kaj konstanteco. Dum la ĉeesta aŭ miksitita lernado, ni devas konstante instigi gelernantojn emfazante la utilecon de la lingvo kaj ĝiajn avantaĝojn el diversaj perspektivoj.

Ni devas ellabori strategiojn por sekvi kun ĉiu interesita individuo, laŭ ilia potencialo, por kreskigi retenon kaj senton de aparteno inter novaj membroj. Gravus kompreni, ke por ke iu interesiĝu pri Esperanto, tiu devas scii, kio ĝi estas. Tial ni

devas pliiĝi diskonigon per amaskomunikiloj kaj partopreni en la socian vivon de nia provinco, nia municipo kaj nia komunumo. Ni devas esti aktivaj kaj sistemaj, ĉar se ni senokupe sidas kaj silentas, ni nenion atingos. Homoj bezonas scii, ke Esperanto estas trezoro, kiu riĉigas nian socian vivon, nian mondrigardon kaj faras nin tutmondaj civitanoj.

En la epoko de novaj informaj kaj komunikadaj teknologioj, Esperanto proponas konsiderindajn ŝancojn por lerni, perfektigi kaj aliri diversajn informojn per ekzistantaj platformoj kaj retejoj.

Ni devas porti Esperanton al la stratoj por kreski pli; ni devas inspiri homojn laŭeble plej bone. Ni ne povas timi paroli pri Esperanto, ĝi estas esenca por la asocio. Ni devas esti ĉampionoj de Esperan-

to en la sociaj kunteksto, kie ni vivas, studas kaj laboras. Kvankam nia asocio ekzistas jam kvardek sep jarojn, ankoraŭ ekzistas kubanoj, kiuj ne scias, kio estas Esperanto kaj neniam eĉ aŭdis pri ĝi. Ni ebligu al la publiko la ŝancon lerni pri ĝi kaj tiel povi elekti ĝin. Pro tio, ni devas konstante novigi diversmaniere por disvastigi ĝin. Ni devas certigi nian sisteman ĉeeston en amaskomunikiloj je ĉiuj niveloj. Ni devas produkti grafikajn materialojn, printi aŭ presigi informfoliojn, okazigi ekspoziciojn, diskutojn kaj prelegojn en edukaj kaj kulturaj institucioj, kaj konektiĝi kun aliaj sociaj grupoj kaj asocioj. Ni estas certaj, ke aliaj ideoj kaj iniciatoj aperos por atingi niajn celojn kaj fidas je via kunlaboro kaj via volo kontribui al nia asocio.



Memlernado de Esperanto – Riĉiga sperto

JORGE ALBERTO DOMÍNGUEZ AGÜERO



Eble kelkaj el vi ankoraŭ ne (multe) konas min, ĉar mi neniam aktivis ĉeeste en la Kuba Esperantujo, sed tamen esperable baldaŭ mi tion faros. Mi estas 22-jara universitata studento el Kamagvejo, kie mi studas la anglan lingvon kun la

franca kiel dua fremda lingvo.

Mi konatiĝis kun Esperanto dank' al mia patro, kiu menciis ĝian ekziston al mi dum ĉemara feriado fruadleske, sed li ne instruis ĝin al mi. Mi memlernis ĝin ekde la 11-a de februaro 2021, kiam mi aĝis 17. Kvankam estas iom malfacile rememori ĉion, mi klopodos rakonti kelkajn detalojn pri mia procezo de mia konatiĝo kun Esperanto kaj enamiĝo al ĝi.

*...vole-nevole
homoj ofte trudas sian lingvon
al aliuloj.*

Mi ĉiam interesiĝis pri la angla, la franca kaj lingvoj ĝenerale. Mi multe ŝatis esplori en **Wikipedio** pri diversaj temoj rilataj al lingvoscienco, historio, kulturo, kaj simile.

Ankaŭ ĝenis min la fakto ke ekzistas tiom da lingvoj en la mondo, kaj ke ne eblas ĉiujn lerni, kaj ke vole-nevole homoj ofte trudas sian lingvon al aliuloj, aŭ lingvon kiu, kvankam tre bela kaj riĉa, estas sufiĉe kompleksa kaj apartenas al tre potencaj nacioj: la angla. Tio igas komunikadon malegaleca kaj maljusta.

Mi do multe pripensis la temon, ankaŭ konsiderante miajn proprajn spertojn en reta komunikado kun fremduloj, kaj ĝuste tiuepoke dum mia vikipedia legado trovis Esperanton. Kaj jen, unutage mi trovis artikolon de malnova blogo de la kubaj esperantistoj, kiu domaĝe ne plu ekzistas. Kaj ĝiaj argumentoj konvinkis min, ke Esperanto lernindas. Do, mi eklernis Esperanton pro idealismo, pro kredo ke ĝi povos alporti ion utilan al la homaro.

*... ĝiaj argumentoj konvinkis min,
ke Esperanto lernindas.*

Mi hazarde trovis rete la lernolibron *Esperanto por el metodo directo* (*Esperanto per rekta Metodo*) de Stano Marček, kaj eklegis ĝin kaj lernis ĝian enhavon poiome. Tamen iuj aferoj ne estis sufiĉe klaraj al mi, kaj mi bezonis aliajn rimedojn, kiuj povu klarigi la gramatikon al mi. Tiel mi trovis alian PDF-dosieron kies nomo estas *Manlibro de Esperanto*, tute en la hispana lingvo.

Sufiĉe rapide, mi komencis uzi la lingvon, unue per simplaj frazoj, kompreneble. Kaj post nur kelkaj semajnoj da lernado mi decidis aliĝi al la reta telegrama **Esperantujo**. Tie mi trovis iom frenezan kaj strangan grupon, kies nomo estas **Nova Esperantujo**, mia unua reta grupo. Poste mi aliĝis al aliaj gravaj telegramaj grupoj, inkluzive de la grupo de nia kuba asocio.

Partopreno en Esperanta **Telegramo** multe helpis min. Mi havis okazon trejniĝi en spontana parolado kun homoj, el kiuj pluraj ne kunhavis mian denaskan lingvon, kaj kelkaj ne parolis eĉ la anglan. Aldone, mi ricevis multe da utilaj korektoj kaj konsiloj, kiuj igis min plibonigi mian uzadon de la lingvo. Kaj plej grave: oni rekomendis al mi kie trovi diversajn esperantaĵojn: bonegajn referencgramatikojn, lernolibrojn kaj beletron.

*En Esperanto
kiel en ajna alia lingvo
mergiĝo estas esenca
por plena regado.*

En Esperanto kiel en ajna alia lingvo mergiĝo estas esenca por plena regado. Necesas aŭskulti paroladojn, spekti filmetojn, legi bonajn librojn, aŭskulti kantojn, kaj aktive uzadi la lingvon ĉu parole ĉu skribe, por vere povi esti flua parolanto. En Esperanto mergiĝo estas iom pli defia, ĉar nia lingvo estas minoritata, sed se oni scias kie serĉi, oni povas trovi multajn interesaĵojn. Estas nepre ĉasi ĉiujn oportunojn por utiligi la lingvon kaj intence apartigi momentojn de la tago por tio, ĉar ni ja ne loĝas en esperanta medio, sed en Kubo, kie la hispana estas ĉie ĉirkaŭ ni.

Mi do, en **Jutubo**, eksekvis multajn E-kanalojn, ĉu por spekti videoblogaĵojn, ĉu por aŭskulti kvalitan muzikon. Ekzistas tre valora retejo: **Tubaro**, kiu kunigas ĉiujn kanalojn kaj filmetojn potenciale rilatajn al Esperanto en unu sama loko; mi ege rekomendas ĝin al tiuj, kiuj deziras navigi Esperantan Jutubon.

Mi aŭskultadis Esperantajn kantojn, komence ĉefe tiujn de la brila duopo Ĵomart kaj Nataŝa, kaj parkerigis ilin. Mi analizis ilian tekston, ilian poezion, ĉar mi intencis preni ilin kiel lernomaterialon: ĉiun vorton kaj esprimon kiun mi ne konis, mi serĉis vortare aŭ demandis al pli kleraj esperantistoj. Mi havis sufiĉe multe da libera tempo tiam, ĉar mi estis liceano kaj ĉeestaj lecionoj estis haltigitaj de la kovima pandemio, tio permesis al mi pli intensan mergiĝon en la lingvo.

Mi krome sufiĉe frue, post nur tri monatoj, ekkonsultis *PMEGon* (*Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*), kio montriĝis certe tre helpa. Mi surpriziĝis, ke la klarigoj de Bertilo estas verkitaj en sufiĉe simpla lingvaĵo, kio ebligas ke nespartaj esperantistoj profitu tiun bonegan pedagogian verkon. Eble ĝi ne estas perfekta, sed la aŭtoro flegas ĝin atente kaj daŭre korektas kaj ĝisdatigas ĝin, ke ĝi estu fidinda fonto de scio pri nia gramatiko. Alia rekomendinda gramatiko, kiun mi fojfoje konsultis, sed jam pli poste, kiam mi havis pli da sperto, estas *PAG* (*Plena Analiza Gramatiko*). Tiu tamen estas iom pli malsimpla kaj faka legaĵo.

*Plezura legado de nia literaturo
fajrigis en mi la amon al la lingvo.*

Ni havas tre riĉan literaturon, kaj originala kaj tradukita. Estas vere granda maro kun tre diversaj ĝenroj kaj temoj. Por komencantoj, libroj kiel *Kar-*

lo de Edmond Privat, *La Verda Koro* de Baghy kaj la verkoj de Claude Piron *Gerda Malaperis*, *Vere aŭ fantazie*, *Lasu min paroli plu*, *Ili kaptis Elzan* estas vere bonaj. Se vi amas *La Eta Princo*, ekzistas bona esperanta traduko; ĝi estis unu el miaj unuaj legaĵoj kaj ĝi ne estas tro malfacila, ĉefe se vi jam konas la rakonton. Se vi estas religiulo, vi povas trovi plurajn religiajn tekstojn kiujn vi jam legis en la hispana, inter kiuj *La Sankta Biblio* estas aparte interesa, ĉar la Malnovan Testamenton aŭ Tanaĥon tradukis Zamenhof mem.

Mi pensas, ke la plezura legado de nia literaturo fajrigis en mi la amon al la lingvo, multe ĝuigis min kaj samtempe lernigis multe da novaj vortoj, esprimoj, proverboj, kaj plibeligis la stilon de mia parolado kaj skribado en Esperanto.

La retaj kongresoj kaj kunvenoj estis alia grava flanko de mia mergiĝo en Esperantujo. Mi partoprenis en kelkaj programeroj de la virtuala TEJO-kongreso **Retoso** en 2023, 2024 kaj 2025. Mi krome kontrolis la retejon **Eventa Servo** kaj partoprenis en pluraj babilrekontiĝoj, inter kiuj elstaras la **Vesperanto**-kunvenoj ĉiumerkrede kaj ĉiusabate.

Mi kompreneble ne ĉiam povis partopreni, sed de tempo al tempo ja. Kaj ne nur por babili oni renkontiĝas rete! Ankaŭ por aprezi la literaturajn verkojn de aliaj esperantistoj, kiel atestas la kunvenoj de la literaturama komunumo de **Bobelarto**: ili legas kaj verkas kune ĉiumonate, kaj mi havis la ĝuon partopreni almenaŭ en la legorenkontiĝoj. Eble mi ankaŭ kuraĝu iam kunverki, ĉu ne? Krom tio, ekzistas kluboj de legado por specifaj libroj, kaj ankaŭ aliaj Esperanto-lernigaj eventoj kiuj okazadas, kelkaj senpagaj, aliaj pagendaj.

*Esperantujo
vere riĉigis mian vivon
multrilate.*

Mi sentas enorman dankemon al multaj esperantistoj kiujn mi konis sur tiu ĉi vojo, ke ili kreis belajn rilatojn kun mi, kundividis sian vivon, instruis al mi tion kion mi demandis kaj orientis min en tiu ĉi mirinda universo kiu estas Esperantujo. Esperantujo vere riĉigis mian vivon multrilate: ĝi estas por mi ĉiutaga lingvo de miaj pensoj, lingvo kiu parolas al mia koro per poemoj, romanoj, kantoj, kaj plej grave: per homa amikeco kaj varmeko.

Kaj kio estas la plej bona afero?

Ke ekzistas multo Esperanto-rilata kion oni povas fari preskaŭ senpage, nur per bona ret-aliro.

Ligiloj al kelkaj el la menciitaj retejoj:

eventaservo.org
bobelarto.ink
tubaro.aperu.net
bertilow.com
telegramo.org
https://t.me/EsperantoEnTelegram
https://t.me/librejo
http://verkoj.com
https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/f/f8/Manlibro_Esperanto.pdf

Esperanto ĉe la Festivalo de la Nacioj en la Franca Liceo de Havano



ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ

Por la dua sinsekva jaro, Kuba Esperanto Asocio, partoprenas la Festivalon de la Nacioj ĉe la Franca Liceo de Havano, multflanka kaj riĉa aranĝo pri kulturoj kaj lingvoj. Temas pri ĉiujara iniciato de la Liceo, ĉi-foje okazinta sabate, la 11-an de aprilo, kaj kies ferma aranĝo estas festivalo kun reprezentiĝo de multaj el la lingvoj kunvivantaj en la institucio. Lige al ĝi kaj samtempe, okazas muzikaj prezentaĵoj. La diversaj nacioj montras sian kulturon per prezento kaj gustumado de manĝaĵoj, trinkaĵoj, poemoj, lingvoj aŭ arta tradicio. Ĉi-jare, Esperanto estis prezentita ĉe la pola stando, tute hazarde sed speciale. Krom ekspozicii E-librojn, alfabeton, ni ankaŭ petis al la interesitoj legi frazojn kaj en la pola kaj en Esperanto, kaj tiuj kun bona legado ricevis premion, allogo por aliaj lernejoj, plejparte adoleskantoj.



Supre, la kuba stando. Foto: LFIH. Malsupre, en la E-stando Cristiano Bassani esperantista itala diplomato deĵoranta en Kubo kaj Ariadna García Gutiérrez, kune reprezentis Esperanton dum la Festivalo de la Nacioj en la Franca Liceo de Havano. Fotoj: Ariadna García Gutiérrez.



Aŭstrio agnoskas Esperanton kiel lingvon de kulturo kaj nemateria heredaĵo

La Aŭstra Komisiono de Unesko formale agnoskis Esperanton kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de Aŭstrio. La oficiala anonco aperis la 16-an de aprilo 2026:

Por la Vicprezidanto de UEA, Seán Ó Riain, estrarano i.a. por Eksteraj Rilatoj, tio esta "brila novaĵo, kiu tute kongruas kun la strategio AKIRI de UEA por la Esperanto-movado – kaj nur kelkajn monatojn antaŭ la 111-a Universala Kongreso de Esperanto en Graco". Post Pollando (2014) kaj Kroatio (2019) Aŭstrio estas la tria lando, kiu fa-

ris ĉi tiun paŝon, kiu estas esence grava pro pluraj kialoj.

Laŭ Ó Riain "unu el la ĉefaj antaŭjuĝoj de kontraŭuloj de Esperanto estas, ke 'ĝi ne havas kulturon'. Ĉi tiu formala agnosko de la kultureco de Esperanto fare de tri landoj nuligas ĉi tiun antaŭjuĝon. La Eŭropa Komisiono agnoskis tion, kun praktikaj sekvoj. Ĝi nun subtenos Esperanton same kiel ĝi subtenas aliajn neoficialajn lingvojn, kiel ekzemple la katalunan, la eŭskan, la bretonan ktp".

UEA dankas ĉiujn aŭstrajn kaj ne-aŭstrajn samideanojn, kiuj kontribuis al ĉi tiu frapa sukceso, kiun la Asocio akompanis kaj subtenis dum la tuta procezo. La Estraro de UEA esperas, ke tio stimulos esperantistojn en aliaj landoj klopodi atingi similan nacian agnoskon, precipe en najbaraj landoj kiel Litovio, Hungario kaj Italio, sed ankaŭ alikon-tinente. "Kiu lando donos nian sekvan sukceson? Ek al laboro!", invitas Ó Riain.

Speciala momento pro tiu agnosko okazos en la 111-a UK.

Esperanto: lerninda lingvo? – Invitaj argumentoj

NORBERTO DÍAZ GUEVARA



– Esperanto? Ne, dankon! Ĝi estas morta. Kiom da homoj parolas Esperanton en la mondo?

La aserto “Ĝi estas morta” devus vekti la sekvan demandon ne nur ĉe esperantisto: “Kial morta?”. La demando pri kvanto de Esperanto-parolantoj bezonas klaran respondon: “Maleblas ekscii tion precize”.

Interesa detalo estas, ke tiu sinteno antaŭ propono lerni la lingvon estas ĝenerala eĉ ĉe personoj, kiuj scias nenion aŭ tre malmulton pri la Esperanta afero.

Se lingvo estas “morta” tute klare maleblas uzi ĝin praktike, kio ne kongruas kun la ekzisto de Esperanto, ĉar en la mondo estas personoj – multaj aŭ malmultaj – kiuj parolas Esperanton. Asocioj, kongresoj, renkontiĝoj, konkursoj, literaturaĵoj, muzikaĵoj, teatraĵoj, kunsidoj pri diversaj temoj, sociaj retejoj... konsistigas la vivan mondon de tutplaneda esperantistaro.

En la bita mondo

Nuntempe, kiam la bita mondo estas tiom avangarda, krozado en la Interreto estas praktika maniero “vidi” la Esperantan mondon.

Sufiĉas nur kelkaj sekundoj por konstati, ke la lingvo Esperanto estas vaste uzata ankaŭ en plej diverstemaj sociaj retejoj.

Cetere, ne multaj homoj – ĉu esperantistoj, ĉu ne-esperantistoj – scias, ke la serĉilo Guglo disponigas

interfacon en Esperanto: <https://www.google.com/eo>.

Do, kune kun la respondo “maleblas ekscii tion precize” indas diskonigi tiujn detalojn kaj proponi prian serĉadon en la Interreto. La rezulto estos certe abunda: kursoj, literaturo, kongresoj, konkursoj, teatraĵoj, muziko, universitata agado, scienca agado...

Operaciumoj kaj aplikajoj. Dankon, Unikodo!

Jes, dankon, ĉar en la komenco estis malfacile videbligi la ĉapelitajn literojn. Oni devis krei makroojn por la redaktilo Word, kaj rezulto de aliaj klopodoj estas la apo Ek!, bonvena ilo pri la ĉapelitaĵoj. En Linukso la afero ne estis pli facila, kaj necesis ja profundajn sciojn pri la operaciumo por sukcese videbligi la ĉapelitaĵojn.

Tajpi (v 2.98, kreita de Thomas James kaj disponebla ĉe <https://es.freownloadmanager.org/Windows-PC/Tajpi-GRATIS.html>) efike anstataŭas Ek! (kies lasta versio estas 3.9, de la 29-a de majo 2010, elŝutebla el <https://www.esperanto.mv.ru/Ek/index.html>) kaj funkcias senprobleme en Vindozoj 8, 10 kaj 11 (probable ankaŭ en postaj versioj).

En repaĝoj necesis uzi kodojn por ĉiu ĉapelita litero (majuskla kaj minuskla). Ekzemple, “ĉ” videbligas “ĉ”, kaj “Ĉ” videbligas “Ĉ”.

La apo UniRed (versio 2.5.0.279 de la 20-a de aprilo 2006), kreita de Jurij Finkel, estas ankoraŭ uzata por krei kaj prilabori Esperantajn tekstojn, kaj krome ĝi disponigas bone funkciantan kontro-

lon pri literumo. UniRed bone funkcias en Vindozo 11, kaj ĝi estas elŝutebla el <https://www.esperanto.mv.u/UniRed/UTF8/index.html>.

En la okazo de Linukso estas Esperanto-klavaroj ne malfacile uzeblaj, kaj eblas videbligi interfacon en Esperanto en plej multaj distribuajtoj.

La Karaktraro (Mapa de caracteres) de Vindozo rapide disponigas ĉiujn ĉapelitajn literojn.





En la mondo de poŝtelefonoj la operaciumo Androido disponigas klavarojn, kaj Samsung, ekzemple, disponigas propran klavaron kun defaŭlta aliro al ĉapelitaĵoj.

Grava flanko de tiu disponebleco estas tio, ke ĉiuj iloj kaj rimedoj estas senpagaj. En multaj okazoj ili estas disponeblaj sub la Ĝenerala Publika Permesilo GNU.

La moderna informadiko estas tre E-kapabla, kaj ankaŭ multaj aplikajoj disponigas Esperantan interfacon: Notepad++ (teksto-redaktilo), LibreOffice (redaktilaro), GIMP (apo por bildoj), VLC (por videbligi videaĵojn), Inkscape (bildo-kreilo), Scribus (PDF-kreilo), inter aliaj.

Kiom da esperantistoj...?

Fakte, demandoj kiel tia estas utilaj precipe por enketoj pri statistiko sed ne por gvidi niajn emojn kaj farojn. Ĉu iam oni demandas pri kiom da homoj iras al plaĝo? Kiom da homoj fumas cigaredon en la mondo? Kiom da homoj festas? Kiom da homoj legas? Kiom da homoj vojaĝas? Kiom da homoj rigardas la Lunon? Kiom da homoj amas? Kiom...? Tuja respondo probable estus “Ho, multaj! Tre multaj!”, sed... kiom estas “tre multaj”? Oni po-



✪ Per la apo Tajpi eblas facile tajpi rekte la ĉapelitajn literojn. ✪ La interfaco de Notepad++ estas disponebla ankaŭ en Esperanto. ✪ Ankaŭ GIMP disponigas interfacon en Esperanto. ✪ Samsung disponigas klavaron kun ĉapelitaj literoj, en la poŝtelefonoj kun Androido. Ekranbildo: La aŭtoro.

vus respondi “Maleblas ekscii tion precize”, kaj la rezulto estus la sama, ĉar oni iras al plaĝo, fumas, festas, legas, vojaĝas, rigardas la Lunon, amas... kaj neniam demandas pri kvanto. Tio estas, ke pli gravas ŝato ol kvanto.

Kiom da homoj scipovas Loxian? La respondo ja ne gravas. La fakto estas, ke probable “multaj” homoj ŝatas la muzikon de Enya. Tamen ili same probable ne scias, ke la tekstoj de ŝiaj kanzonoj “Less than a Pearl”, “The River Sings” kaj “Water Shows the Hidden Heart” estas verkitaj en Loxian, arta lingvo kreita de la irlanda poetino Roma Ryan.

Cetere, kiom da homoj scipovas Klingon, Oestron, Galactic Basic?

Esperantistoj, do, okupiĝu pri Esperanto, ĝiaj donitaĵoj, ĝia utilo... Ni uzu la lingvon kun (multaj aŭ malmultaj) esperantistoj kaj invitu ne-esperantistojn lerni kaj same ĝui ĝin, kaj ni lasu kvanton komforte kuŝi en statistiko.

Kion eblas fari per Esperanto?

Ĝi estas komunikilo, kaj ilo per si mem faras nenion. Ĝi estas uzebla de kreanto. Kion eblas fari per peniko? Pentraĵon! Certe; sed ankaŭ simplan tamen utilan afiŝeton por la datrevena festo de amiko. Kion eblas fari per gitaro? Muzikaĵon; sed necesas unue scipovi gitarludi.

Do oni unue lernu Esperanton, kaj poste oni trovas abundajn farotaĵojn: legi Esperantajn eldonaĵojn de bonegaj literaturaĵoj, konatiĝi kun homoj el diversaj mondopartoj, vastigi la proprajn sciojn pri kulturoj... krei!

Esperanto estas tie, libera kaj uzebla sendepende de la kvanto de Esperanto-parolantoj.

Ek!

*Estas tiom eta la penado
postulata de la lernado de
Esperanto, kaj tiom grandaj
la utiloj de tiu lernado,
ke neniu homo devas rezigni
tiun klopodon.*

[“Son tan insignificantes los sacrificios que todo hombre debe realizar para aprender Esperanto, y tan inmensos los beneficios que de ello han de resultar, que nadie debe renunciar a hacer la prueba”].

León Tolstói



La vortprovizo de Esperanto permesas pritrakti plej diversajn temojn. Foto: La aŭtoro.




La E-kongresoj estas pintaj aranĝoj, ĉu naciaj, ĉu internaciaj. Foto: La aŭtoro.



Diverstemaj prelegoj riĉigas la sciojn de esperantistoj. Foto: La aŭtoro.

Kálmán Kalocsay, giganto de la Esperanta Parnaso



La jaro 2026 markas la 50-an mortodatrevenon de unu el la plej elstaraj figuroj de la Esperanta literaturo: Kálmán Kalocsay, naskiĝinta la 6-an de oktobro 1891 en Abaújszántó. Kalocsay estis ne nur poeto kaj tradukisto, sed ankaŭ redaktoro kaj lingvisto, kies influo profunde markis la evoluon de la lingvo mem. Profesie, Kalocsay estis infektologo en la hospitalo Szent László en Budapeŝto, kie li laboris dum 46 jaroj. Li doktoriĝis pri medicino kaj akiris vastan renomon kiel fakulo pri infektaj malsanoj. Lia Esperanta kariero komenciĝis en 1911. En 1921 aperis lia unua poemaro *Mondo kaj Koro*. Sed la vera mejloŝtono estis


Streĉita Kordo (1931), kiun multaj konsideras la komenco de klasika Esperanta poezio. Per tiu verko, kune kun *Parnasa Gvidlibro* (1932), li fiksas la regulojn de Esperanta versfarado, donante al la lingvo egalan teknikajn eblojn kiel naciaj lingvoj.

Kiel ĉefredaktoro de *Literatura Mondo*, li estis la spirita gvidanto de la tielnomata “Budapeŝta skolo”, kiu forigis la diletantismen el Esperanta literaturo. Krom originala verkado (inkluzive de erotika *Sekretaj Sonetoj* sub pseŭdonimo), li estis majstra tradukisto, transdonante verkojn de Shakespeare, Dante, Goethe, Baudelaire, kaj precipe klasikajojn el la hungara literaturo kiel *La Tragedio de l’ Homo* de Madách.

Kalocsay ĝis sia morto, okazinta la 27-an de februaro 1976 en Budapeŝto, restis aktiva, lasante post si gigantan verkaron, kiu inkluzivas la fundamentan *Plena Gramatiko de Esperanto*. Lia vivo kaj laboro certigas lian lokon sur la Parnaso de la internacia lingvo.

Kaj jen donace al la legantaro ni lasas la unuan strofon de la poemo “Sunsu-biro” el la kolekto *Streĉita Kordo* (1931) de Kálmán Kalocsay:

*Jam iĝis kupro la tagmeza or’.
Ĉe l’ horizont’ la sun’ adiaŭluma,
Okul’ gigante granda, plorbruluma
Rerigardante pasas drone for.*



William Auld: “Mi kredas pri la bonvolo de l’ homaro”



Ĉi-jare UEA atentigas pri la 20-a mortodatreveno de William Auld, rekonata kiel majstro de la esperanta poezio. Kiam oni parolas pri la Esperanta literaturo, unu nomo staras super la ceteraj en la dua duono de la 20-a jarcento: William Auld. La skota poeto, tradukisto kaj verkisto ne nur estis la plej elstara figuro de la moderna Esperanta poezio, sed ankaŭ la unua kaj ĝis nun sola Esperanto-verkisto nomumita por la Nobel-premio pri literaturo. Lia vivo, ligita al la sortoturnoj de la 20-a jarcento kaj al profunda dediĉo al la internacia lingvo, prezentas fascinan rakonton pri kiel arto povas flori eĉ en la plej neatenditaj medioj. La vojo al Esperanto komenciĝis en 1937, kiam Auld estis 13-jara skolto. Legante skoltan regularon en Esperanto, li malkovris la ekziston de tiu lingvo.

Tiu renkontiĝo estis decida: li eklernis la lingvon kaj komencis praktiki ĝin kun amikoj John Francis kaj Reto Rossetti, kiuj kune kun John Dinwoodie poste formis la tiel nomatan “skotan skolon” de la Esperanta literaturo.

En 1947, Auld publikigis sian unuan verkon – tradukon el la angla – en la dua eldono de la nova revuo *Esperanto en Skotlando*. Li kontribuis al tiu periodaĵo dum pluraj jaroj, kaj ĝi fariĝis forumo por novaj aŭtoroj.

La jaro 1952 markis turnopunkton. Auld kune kun John Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti publikigis la poemaron *Kvaropo*. Tiu verko estis la komenco de la grava libroserio Stafeto, fondita de Juan Régulo Pérez en Kanarioj, kiu transprenis la rolon de la ĉesinta *Literatura Mondo*. *Kvaropo* estas konsiderata la komenco de la post-Parnasa periodo de la Esperanta literaturo.

En 1956 aperis la plej fama verko de Auld, *La infana raso*. Tiu longa poemo de 25 ĉapitroj (aŭ kantoj) esploras la rolon de la homa raso en la tempo kaj en la kosmo. Ĝi estis parte inspirita de *The Cantos* de la usona poeto Ezra Pound.

La infana raso estas konsiderata la ĉefverko de Auld kaj unu el la kulminoj de la Esperanta literaturo. La poemo konfirmis Auld kiel la plej elstaran Esperanto-verkiston de la postmilitaj jaroj. Ĝi estis tradukita en la nederlandan, portugalan, hungaran, kaj ankaŭ en la anglan, la skotan kaj la gaelan.

Ĉar en 2026 Esperantujo memoras la 20-an datrevenon de la forpaso de William Auld, majstro de la esperanta poezio, jen lia donaco:

*Ho kara mia,
jen povra testamento
jen mia kredo
espero kaj tormento:
mi kredas pri la
bonvolo de l’ homaro,
ke iam pasos
kruelo kaj amaro,
ke iam venos
la regno de l’ racio;
sed multaj larmoj
necesos antaŭ tio.*



INFORMILO

ESTRARO

Prezidanto: Alberto Fernández-Calienes Barrios, p/a Esperanto-Centro Havano, Vista Alegre 264, La Víbora, 10 de Octubre, 10500 La Habana. ✉ acalienes@gmail.com.

Ĝenerala sekretario: Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212 entre Gertrudis y Josefina, Reparto Sevillano, 10 de Octubre, 10500 La Habana. ✉ itzagutierrez@gmail.com.

Kasisto: Pedro Fernández Rodríguez, Requena 17, apto. 1 entre Salvador Allende y Lugareño, Plaza, 10400 La Habana. ✉ pechjofernandez43@gmail.com.

Estraranoj: Julián Hernández Angulo (Kapablago, Instruado), Ave. del Norte 12012, apto. 6 entre Primelles y Ave. de los Ocujes, Palatino, Cerro, 10600 La Habana. ✉ hernandezangulojulian@gmail.com. / Ariadna

García Gutiérrez (Informado), Avellaneda 212 entre Gertrudis y Josefina, Reparto Sevillano, 10 de Octubre, 10500 La Habana. ✉ itzagutierrez@gmail.com. / Magaly Molina Suárez (Kulturo, Komunumo), Reyes 390 apto. 10 entre Pocito y Luz, Lawton, 10 de Octubre, 10500 La Habana. ✉ magalymolinasuarez@gmail.com

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 2026. 🇨🇺 **Pinar del Río (1):** Yoan Michel Rodríguez Martínez.

🇨🇺 **La Habana (22):** Alberto Fernández-Calienes Barrios, Alejandro García Acosta, Ariadna García Gutiérrez, Daimi Doval Delsa, Digna Mayra Morales Burón, José Evelio Cárdenas Zúñiga, Maritza Gutiérrez González, Miguel Ángel González Alfonso, Olga Lidia Barrios Cunningham, Pedro Fernández Rodríguez, Yordán Fonseca Olivera, Ismary Lezcano García, Magaly Molina Suárez, Javier Ramos

Nistal, Lázaro E. Ochoa Yzquierdo, Ronald Sánchez Rodríguez, Lucía Hernández Gordón, Gabriel Micolon, Yamaris Padrón Quintero, René Beatón Lobaina, Digna Lauzán Domínguez, Julián Hernández Angulo. 🇨🇺 **Villa Clara (2):** Eddy Machado Hernández, Roberto Molina Gálvez.

AMIKOJ DE ESPERANTO (4): 🇨🇺 **La Habana (4):** Alina Valdés Hernández, Marubeni Mirayes Gutiérrez, George León Domínguez, Thomas Haffner.

DONACOJ (CUP 1010.00): Deyse Ríos Montalvo (80.00), Gabriel Micolon (80.00), Yoan Rodríguez Martínez (30.00), Alberto A. Cabreja (40.00), Maritza Gutiérrez González (40.00). Anonime (740.00).

Al ĉiuj KEA tre kore dankas.

esperanto.cu estas trimonata bitbulteno de KEA. **Kunlaboris en tiu ĉi n-ro:** Maritza Gutiérrez González, Ariadna García Gutiérrez, Jorge Alberto Domínguez Agüero, Julián Hernández Angulo kaj Norberto Díaz Guevara. **Ĉefredaktis kaj enpaĝigis:** Alberto Fernández-Calienes Barrios. N-ro 2/2026 aperos komence de julio. Kunlaboraĵojn bv. sendi al: esperanto@cubarte.cult.cu.

NEKROLOGO



D-rino Albania DUTHIL ÁLVAREZ. (Holguín, 1947.12.09–Havano, 2026.04.06). Bestkuracistino. Eklernis Esperanton 1987 en Havano. Laboris kiel oficistino en KEA. De 2006 ĝis 2014 oficis kiel estrarano pri Disvastigo. Dum pluraj jaroj IM de UEA. Partoprenis UKojn (Havano, 1990, 2010; Roterdamo 2008; Bonaero 2014) kaj ĉiujn E-eventojn organizitajn en Kubo. Ŝi estis ofta partopreninto en la Zamenhofaj Me tiejoj okazintaj en Guantánamo. Kuba Esperanto-Asocio kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

**Amika voĉo el Kubo,
libera teritorio
en Ameriko**

RADIO HAVANO KUBO
Kurtondaj kaj retaj elsendoj
en Esperanto
Nun ankaŭ en 102,5 MHz FM



<https://www.radiohc.cu/eo/inicio-esperanto-2/>



Universala Esperanto-Asocio (UEA) ligas Esperanto-parolantojn tra la tuta mondo. UEA organizas Esperanto-kongresojn, kunordigas landajn kaj fakajn asociojn en pli ol 120 landoj. Ĝi eldonas librojn kaj gazetojn en Esperanto, subtenas kursojn kaj kulturajn eventojn. Kiel Ne-Registara Organizaĵo (NRO) ĝi partoprenas la agadojn de UNO kaj Unesko kaj laboras por lingva justeco en la mondo. Se vi deziras fariĝi Individua Membro de UEA, vi povas pagi al KEA 7.- eŭrojn aŭ ekvivalenton en CUP laŭ la kuranta kurzo.



111-a Universala Kongreso de Esperanto
Kongresejo: Congress Graz
Graz, Aŭstrio
1-8 aŭgusto 2026

Kongresa temo:
*Volontulado en la servo al
daŭripova evoluigo*



82-a Internacia Junulara Kongreso
Kongresejo: Alberg La Conreria
Tiana, Katalunio, Hispanio
9-16 aŭgusto 2026

Kongresa temo:
Naturo el la homaj okuloj



59-a Kongreso de ILEI
Kongresejo: Zaozhuang-a Universitato
Zaozhuang, Shandong-Provinco, Ĉinio
10-16 julio 2026

Kongresa temo:
*Eduki profesiajn esperantistojn
kaj protekti Esperanto-kulturon*